



ĈARTO DE LA ASOCIO *TERRALLIANCE* (TERALIANCO)

Terralliance estas asocio laŭ la (franca) leĝo 1901, sen profitdona celo, kreita en marto 2004 je la iniciato de gebonvoluloj ne aliĝintaj al iu politika movado.

Artikolo 1:

La Asocio *TERRALLIANCE* prioritare agadas en la kampo de la **Protektado de la Planedo Tero kaj de ĝia homaro** kaj promocias valorojn de **Paco, Solidareco, Konscio, Respekto**.

La Asocio sin deklaras sendependa de ĉiu religia aŭ politika movado.

Artikolo 2 :

La valoroj promociitaj de la Asocio fontas el la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj el la Deklaro pri la Rajtoj de la Homo kaj de la Civitano, kies la 1a artikolo atestas ke :

" Ĉiuj homoj naskiĝas liberaj kaj rajte egalaj.

Ili estas dotitaj per racio kaj konscio kaj devas agi en reciproka fratecemo."

Artikolo 3 :

La asocio taksas la malfermecon, koran kaj spiritan, la plej grava kvalito por dialogi kaj volas privilegii la konstruigajn sinergiojn.

Artikolo 4 :

La asocio ekiras de duobla konstato :

1/ la stato de la planedo entute pli kaj pli malboniĝas ; tion pruvas la multaj fratmurdantaj militoj kaj la difektiĝo de nia cirkaŭaĵo.

2/ la nombro de lokaj iniciatoj kaj la individua konsci-nivelo pligrandiĝadas, tamen ŝajnas ke la solidaraj internaciaj iniciatoj efikas nur dum mallonga tempo.

Artikolo 5 :

Je la monda nivelo :

La asocio celas :

- **kunigi la ekzistantajn movadojn, kiuj agadas favore al protektado de la planedo kaj al internacia solidareco,**
- **ekkoni kaj ampleksigi la sinergiojn kaj la interlandan kunlaboron.**

La asocio estigas solidarajn okazaĵojn, kiuj havas simbolan valoron por pli bona ekkonscio de la tuta homaro.

Je la nacia nivelo :

La asocio :

- ▶ partoprenas en informado kaj responsigo de la civitanoj pri la nuna stato de la planedo.
- ▶ Prilumas la grandajn debatojn pri etiko kaj atentigas pri daŭripova disvolviĝo konsiderante la estontajn generaciojn.
- ▶ kuraĝigas pli grandan individuan responsecon, por tiel favorigi la stariĝon de solidaraj agadoj kolektivaj.

***Terralliance* impulsas kaj jare kunordigas la Mondan Ter-Festivalon, ĉirkaŭ la somera solstico, dum 7 tagoj.**
